

Jara raporto de la TEJO-estraro kaj -komisiitoj

2012/2013



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam

Nederlando

www.tejo.org

Kompilita de Paweł Fischer-Kotowski

Varsovio, la 2-a de aŭgusto 2013

Enhavo

Enkonduko – p. 3

1. Administrado – p. 3

2. Kunordigo kaj homaj rimedoj – p. 4

3. Financoj – p. 5

4. Landa agado – p. 5

5. Informado – p. 6

6. Eksteraj rilatoj – p. 9

7. Edukado – p. 11

8. Kongresoj – p. 11

9. Aktivula trejnado kaj seminarioj – p. 12

10. Volontulo – p. 13

11. Oficisto – p. 14

12. Komitato de UEA – p. 16

13. Pasporta Servo – p. 16

14. Adoleska agado – p. 17

15. TEJO-aktuale – p. 17

16. TEJO tutmonde – p. 18

17. Kontakto – p. 20

18. Mallongigoj – p. 21

Enkonduko

Jen ni prezentas al vi nian sekvan jarraporton, kiu koncernas la periodon ekde la IJK 2012 en Hanojo, Vjetnamio, ĝis la IJK 2013 en Nazareto, Israelo. Tiu ĉi jaro pasis sen ajnaj ŝanĝoj en la estraro kaj finiĝas per pluraj rekandidatiĝoj, kio ŝuldiĝas al la fakto, ke kreiĝis diverseca, sed bone kunlaboranta estrara teamo subtenata de ĉiam pligrandiĝanta aro de aliaj aktivuloj. En tia medio ni realigadis jaran planon, en kiu ne brilis iuj unuopaj elstare grandaj projektoj, sed diversaj agadoj abundis.

Inter la gravaj punktoj menciindas certe la daŭranta jubilea jaro de *Kontakto* kaj diversaj aferoj ligitaj kun la 50-jariĝo de nia revuo – eldono de la T-ĉemizoj, pli granda nombro de koloraj paĝoj, konkursoj kaj aliaj. Por organizantoj de aranĝoj certe utilos tasklistaro “Superrigardo de taskoj por eventoj” kaj sekvanta ĝin nova tiutema paĝo en tejo.org kun ankoraŭ pli ampleksa kolekto de materialoj. Aldone, ĉeestintoj de JES povis trejniĝi pri la sama temo dum la okazinta tie TEJO-Seminario. KER-kampe plej rimarkindas nia reaktiviĝo en Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizo, kiu estas logika konsekvenco de niaj reaktiviĝoj en FOJE kaj en Unesko en la antaŭaj jaroj. Certe gravis, feliĉe bone finiĝinta, baraktado pri interpreto de nia jura personeco, kiun ni havis kun EACEA – instanco respondeca pri la administraj subvencioj de Youth in Action (Junularo en Ago). El la fino de la oficperiodo menciindas akreditigo de TEJO ĉe EVS, kio ebligas al ni havi EVS-volontulon en la venonta jaro. Plie, ni ricevis aliĝpeton de Ĉilia Esperantista Junulara Organizo, kiu volas iĝi la sekva landa sekcio de TEJO. Jen nur kelkaj el la abundo de aktivaj okazintaj ĉi-jare pri kiuj eblas ekscii danke al ĉi tiu raporto.

Bonan legadon!

Łukasz Żebrowski
Prezidanto de TEJO

Administrado

raportas Paweł Fischer-Kotowski, ĝenerala sekretario

Laŭ rekomendo de TEJO en la 97-a UK la Komitato de UEA ŝanĝis la Regularon pri TEJO. Samtempe ekvalidis ankaŭ la Reglamentej aprobitaj fine de la jaro 2011 fare de la Komitato de TEJO. La modifoj en ambaŭ dokumentoj temas ĉefe pri polurado; unu grava ŝanĝo rilatas la agadcelojn de la organizo. La tri novaj celoj estas: (1) kontribuo al la Esperanta kulturo; (2) helpo al la junularo havi aktivan rolon en konstruo de socio inkluziva, internacia, interkompreniĝa kaj rajtrespekta; kaj (3) plibonigo de la kondiĉoj kaj organizaj kapabloj de la aktivuloj kaj instigo de ilia kultura evoluo.

Post la ŝanĝoj en la konsisto de la Estraro de TEJO okazintaj en la antaŭa jaro, en la 68-a IJK la Komitato de TEJO alektis en la Estraro Paweł Fischer-Kotowski por la posteno de ĝenerala sekretario. Ekde tiam la Estraron de TEJO konsistigas sep personoj: Łukasz Żebrowski (prezidanto), Paweł Fischer-Kotowski (ĝenerala sekretario), Nico Huurman (kasisto), Sergeo Tyrin (unua vicprezidanto, informado), Michael Boris Mandirola (dua vicprezidanto, eksteraj rilatoj), Petra Smidéliusz (landa agado kaj edukado), Tina Tišljarić (kongresoj). La dujara oficperiodo de la nuna Estraro – elektita en la 67-a IJK en Kievo,

Ukrainio – finiĝos en la 69-a IJK en Nazareto, Israelo. La novan Estraranon elektos la Komitato.

Ekde la hanoja kongreso okazis du estraraj kunvenoj – en Roterdamo, Nederlando (novembro-decembro 2012) kaj en Novaro, Italio (marto 2013). En la cetera tempo la Estraro ĉiumonate kunvenis rete kaj tiel traktis aktualajn aferojn kaj planis plej proksimajn agadojn.

La komitata oficperiodo atingis sian duonon. La Komitaton konsistigas nun 36 personoj: 25 komitatanoj A (nomumitaj de la landaj kaj fakaj sekcioj), 3 komitatanoj B (elektitaj de la individuaj membroj), 1 komitatano C (elektita de la komitatanoj A kaj B) kaj 7 estraranoj. La oficperiodo de la Komitato komenciĝis en junio 2012 kaj daŭros ankoraŭ unu jaron – ĝis la fino de majo 2014.

En la modifita komitata reglamento aperis nova punkto pri komisionoj. Nun ĉiu komitatano devas membri en almenaŭ unu komisiono de TEJO. Ekzistas sep komisionoj: Komisiono pri Eksteraj Rilatoj, Komisiono pri Aktivula Trejnado, Komisiono pri Kulturo, Komisiono pri Pasporta Servo, Komisiono pri Landa Agado, Komisiono pri Adoleska Agado, Komisiono pri Informado. Kelkaj el ili apenaŭ funkcias, dum tiuj pri eksteraj rilatoj kaj kulturo elstaras pro sia aktiveco.

Ekde septembro 2012 en la Centra Oficejo en Roterdamo kiel TEJO-volontulo deĵoras Quentin Weber-Seban kaj la Estraro jam elektis lian posteulon – Rogier Huurman, kiu eklaboros post la 69-a IJK. Apud la volontulo multan laboron plenumas duontempa oficisto – en novembro 2011 por tiu posteno estis elektita Manuela Ronco kaj la kontrakto kun ŝi estis plilongigita por plia jaro.

Ja la fino de la jaro 2012 TEJO havis 1983 membrojn, el kiuj 371 estis individuaj kaj 1612 membriĝis pere de siaj landaj sekcioj. La organizon subtenis 83 Patronoj, el kiuj 23 dumvivaj.

La aktivuloj de TEJO – estraranoj, komitatanoj, komisiitoj, volontulo kaj oficisto – regule raportas pri siaj agadoj. Iliaj raportoj aperas en la formo de la monata cirkulero, dissendata pere de la komitata diskutlisto. Ĉiuj arkivaj numeroj estas konsulteblaj en la publika TEJO-vikio (<http://www.tejo.org/vikio>).

Kunordigo kaj homaj rimedoj

raportas Łukasz Żebrowski, prezidanto

Ene de la Estraro ĉi-jare rimarkeble kreskis efikeco de nia laboro. Ni daŭrigis kun iom pli oftaj retaj estrarkunsidoj, kio unuflanke plibonigis nian laborritmon kaj regulan kontroladon de tasklistoj, kaj aliflanke ebligis al ni ne plu retkunsidi ĝis malfruaj noktaj horoj, kio sendube ne estis efika. Por enkonduki pli facilan kontroladon de taskoj, ni elprovis plurajn rete haveblajn tiucelajn sistemojn. La konkludo estis tamen, ke por la Estraro plej bona solvo estos la plej simpla – nome la Kalendaro de Google. Ni havas kreitan komunan kalendaron en kiu ni havas ĉiujn gravajn fendaĵojn kaj limdatojn. Kune kun la nova laborplano aperos tie ankaŭ limdatoj starigitaj ene de tiu dokumento. Sekve, la taskoj estos aldonataj tie same, kiel nun ili estas aldonataj al niaj estrar-vikiaj tasklistoj.

Ĉe la Komitato la plej grava ŝanĝo estis deviga partopreno de ĉiu komitatano en almenaŭ unu el la TEJO-komisionoj. Tiu novaĵo evidente nur parte sukcesis. Ni rimarkis, ke iom da

komitatanoj danke al tio aktiviĝis en la komisionoj, sed evidente ni estas ankoraŭ sufiĉe for de la celo – ĉiuj komitatanoj. Kompreneble ni konscias, ke tio estas procezo kaj ĝi iom daŭros. Aparte menciindas tamen la fakto, ke ekfunkciis nova kultura komisiono.

Komiteate ni proponis novan manieron prepari laborplanon por la venonta jaro. Ĝis nun ĝi ĉiam estis preparata nur post la elekto de la nova Estraro. Ĉi-foje ni komencis labori multe pli frue kaj esperas havi pretan laborplanon por la komitatkunveno. Kiam mi verkas tion la preparado ankoraŭ daŭras, sed evidente rimarkindas, ke ni ricevis kelkajn proponoj de landaj sekcioj kaj ankaŭ kelkajn de individuaj membroj, kiuj ankaŭ ricevis kontribualvokon.

Celante la membraron ni estis preparantaj du projektojn, kiuj bedaŭrinde ne ankoraŭ sukcesis. La Aktivula Datumbazo progresis ĝis pretigo de la unua prototipo kaj decido pri ŝanĝo de la programlingvo. Bedaŭrinde, poste la programanta la datumbazon Clemens Fries ne plu havis sufiĉe da tempo por evoluigi la projekton, do nun necesos verŝajne reiri kelkajn paŝojn malantaŭen kaj rekomenci kun alia programisto.

Kompletige al la Aktivula Datumbazo ni intencis renovigi la homrimedan parton de tejo.org kaj publikigi tie kunlaboranancojn. Bedaŭrinde pro la problemoj kun la aktualigita mastrumsistemo de tejo.org ajnaj partaj renovigoj fariĝis ne tro fareblaj kaj finfine ankaŭ malindaj, ĉar nuntempe profundan plibonigon bezonas nia tuta retejo. La konkludo do estas ke tiu projekto estu efektivigita kadre de pli vasta rekonstruo de tejo.org.

Financoj

raportas Nico Huurman, kasisto

Komence de la financa jaro 2012 mi transprenis la kasistecon de Alisa Nikitina. Dum la jaro ni havis sufiĉe da defioj en la rilato kun nia ĉefa fonto de enspezoj, la agentejo de la subvencio Junularo en Ago. Ni ne ricevis la administran subvencion por la jaro 2012. Dum la jaro ni sukcesis tamen ricevi la restantajn 20% de la subvencio por 2010. La finan raporton por la administra subvencio de la jaro 2011 ni antaŭ nelonge fintraktis. La kompletigan sumon de ĝi ni ricevas en 2013, tiu enspezo do aperos en la venontjara financa raporto.

Dum la enspezoj signife malkreskis, niaj elspezoj forte kreskis. Tio ĉefe fontas el la fakto ke ni havis dum la tuta jaro dungitan oficiston, Manuela Ronco. Krom tio la elspezoj por KER forte kreskis. Ĉefe temas pri repagoj de la vojaĝkostoj de la aktivuloj de antaŭaj jaroj, kiuj ne estis traktitaj en la periodo de Alisa Nikitina. Pozitiva notindaĵo estas la enspezo pro la signifa profito de la 65-a IJK en Liberec (2009), kiu estis fintraktita kun iom da prokrasto en 2012.

En aparta raporto vi povas trovi la jarkalkulon pri 2012 kun kelkaj klarigoj.

Landa agado

raportas Petra Smidéliusz, estrarano pri landa agado kaj edukado

Dum tiu jaro mi klopodis akiri novajn landajn sekciojn. Mi havis daŭran kontakton kun pakistanaj, indoneziaj kaj ĉiliaj junuloj. Ĉilia Esperantista Junulara Organizo pretas por la aliĝo al TEJO. Heidi Goes helpis ekprepari la aliĝpeton de la indonezia asocio, sed finfine ŝi konsideris pli utile unue fortigi la tiean plenkreskan movadon kaj post iom da tempo okupiĝi

pri la junulara sekcio. La pakistanan junularon ni daŭre apogas por pretiĝi al la aliĝo al TEJO. Estis unu asocio kiu oficiale malfondiĝis – Flandra Esperantista Junulara Asocio (en 2012).

KODEJO 2012 estis plenigita de 24 asocioj ĉi-jare, la unuan fojon partoprenis Ĉilia Esperantista Junulara Organizo kaj Junularo Esperantista Pakistana. Mi verkis raporton pri la rezultoj de ĝi.

Por helpi internaciajn kaj interorganizajn kunlaborojn, mi kolektis agemajn junulojn kaj kunigis ilin en 10 diversaj laŭgeografiaj komisionoj por ke ili povu ekigi dialogojn, plani komunajn projektojn, helpi fondi aŭ vigligi organizojn en aliaj landoj de la koncerna mondparto, aŭ simple interŝanĝi ideojn. La projekton mi konsideras parte sukcesa, ĉar dum la kontaktado de aktivuloj, mi ekkorespondis kun 60–70 agemaj junuloj, sed finfine la projekto fiaskis, ĉar neniu el la junuloj pretis akcepti la respondecon gvidi la grupojn, kaj mi sola ne kapablis gvidi 10 komisionojn. La nesukceson de tiu projekto verŝajne kaŭzis la fakto, ke mi ne donis konkretajn celojn/ideojn/gvidliniojn al la grupoj kaj la aktivuloj ne sentis sin sufiĉe motivitaj elpensi proprajn projektojn.

Informado

raportas Sergeo Tyirin, unua vicprezidanto kaj estrarano pri informado

Jen estas finiĝanta la dua jaro de la mandato de ĉi tiu Estraro, respektive mia oficperiodo kiel estrarano pri informado. Retrorigarde al tiuj ĉi du jaroj, mi povas konstati ke dum la unua okazis multe pli verva agado kaj pluraj aferoj estis antaŭenigitaj kompare al la dua – dum kiu ĉefe la klopodo estis plufunkciigi la servojn en taŭga nivelo. Mian tempo-dediĉon dum la dua jaro negative influis la devigita okupiĝo pri la administraĵoj de la IJK okazonta en Israelo, kiuj en la lastaj monatoj kondukis al tio, ke mi tute ne disponeblis por prizorgi iujn novajn projektojn. La laborplano 2011–2013, ellaborita kaj amendita de la Estraro, kaj specife ĝia ĉapitro pri informado, laŭ mi ne estis iel aparte tro-ambiciaj; tamen, multaj eroj en ĝi necesigis engaĝiĝon de pliaj personoj, kio malofte okazis.

Informado fare de la Estraro

Ekde kiam Quentin Weber-Seban komencis sian laboron kiel volontulo de TEJO, la raportoj pri la estraraj kunsidoj regule aperas – koncizaj post la retaj kunsidoj kaj ampleksaj post la fizikaj. Ili legeblas en la komitata retlisto (kiu estis pro la komitata decido malfermita por publika aliro). La raportoj pri la fizikaj kunsidoj daŭre estas afiŝataj ankaŭ en tejo.org en la formo de artikoloj. Krome, en la listo kaj en Facebook-paĝo de TEJO aperas mesaĝoj pri variaj gravaj temoj – okazaĵoj ene de TEJO aŭ kiuj koncernas ĝin.

Ĉiuj tiuj manieroj komuniki kun la Komitato kaj la TEJO-membroj certe estas gravaj, sed pro tre malmultaj reagoj en ĉiuj tiuj kanaloj malfacilas taksu ilian efikecon.

La prezidanta blogo (tejo.org/blogo/prezidanto) pro longe daŭrantaj problemoj kun la retejo bedaŭrinde tre malmulte aktivis dum la pasinta jaro kaj havis nur unu enskribon. Tiu enskribo, tamen, koncernas gravan kaj ampleksan projekton finpretigitan antaŭ nelonge: la “Superrigardo de taskoj por eventoj”, dokumento enhavanta tasklistojn kaj gvidliniojn por organizaj teamoj.

Engaĝigo de membroj

La sociaj retejoj proponas eblecon de rekta diskuto kun la membroj de la organizo. TEJO havas paĝon en Ipernity (ipernity.com/home/tejo; kun 128 abonantoj, sed apenaŭ aktiva), paĝon (facebook.com/tejo.org, 1376 abonantoj) kaj grupon (802 membroj) en Facebook. La volontulo de TEJO krome havas konton ĉe Facebook (facebook.com/tejoofficejo, 2184 ‘amikoj’) kaj konton ĉe Twitter (twitter.com/tejoofficejo; 382 sekvantoj, kvankam nesufiĉe aktiva). Ĉiuj tiuj kanaloj funkcias nuntempe nur kiel ‘kriejoj’ – TEJO aŭ aktivuloj afiŝas tie anoncojn; vera diskuto ne okazas. Mi opinias, ke kiel disvastigilo de informoj, la kontoj de TEJO en la sociaj retejoj jam trafe plenumas sian rolon. Estas tamen inda, ke la venonta Estraro evoluigu strategion kiamaniere stimuli diskutojn pri TEJO, Esperanto en la junulara medio kaj pri problemoj de junularo solveblaj per Esperanto – kaj tiel elĉerpu la potencialon de la socireteja medio, samkiel donu al la membroj la senton de aktiva partopreno en la organizo.

Eldonaĵoj

Kontakto

Rogener Pavinski daŭrigis la bonan laboron kiel redaktoro de *Kontakto*, ankaŭ provante aktive engaĝigi la legantojn. Por la jubilea 50-a jaro de la revuo estis refreŝigita la aspekto kaj starigita serio “intervjuoj kun eksaj redaktoroj”, kiu donas perspektivon pri la historio de la revuo. Same estis kreita kunlaboro kun Varsovia Vento per reciproka komentario. La konstantaj kunlaborantoj de la revuo ekde iom da tempo havas propran Facebook-grupon, kio ebligas al la redaktoro pli efikan redaktadon.

Konkretigita estis la transpreno fare de la Kultura Komisiono de TEJO de la branĉo “Kanto” en la Belartaj Konkursoj de UEA, kiu estis suspendita. La Muzika Konkurso (okazonta en nova formo ekde 2014) estos gvidata de TEJO kaj *Kontakto* estos ĝia ĉefa informkanalo.

En sociaj retejoj *Kontakto* havas 360 abonantojn ĉe la Facebook-paĝo (113%-a kresko kompare al la situacio antaŭ unu jaro), 101 abonantojn ĉe la Ipernity-paĝo (7%-a kresko) kaj 587 sekvantojn ĉe Twitter (48%-a kresko).

TEJO tutmonde

La movada informilo de TEJO aperas akurate kiel rubriko en *Kontakto* kaj kiel junulara paĝo en la revuo *Esperanto*, en ĉiu numero. Szabolcs Szilva, la redaktoro, elektas inter la alvenantaj kontribuoj kiu pli taŭgas por ĉiu el la medioj. Laŭ interkonsento kun Stano Marček, la redaktoro de *Esperanto*, estas rezervita spaco por la TT-paĝo, kiu nepre aperas en ĉiu numero (kaj ne plu estas ellasita pro aliaj kontribuoj, kio foje okazis antaŭe).

Dum la 67-a IJK en 2012, *TEJO tutmonde* tandeme kun la ret-radio Muzaiko aperigis rakontojn pri ĉiu tago de la kongreso (TT en skriba formo en la blogo, Muzaiko en voĉa formo). Tio ebligis al ne-ĉeestantoj sekvi la okazaĵojn de la kongreso. La sperto estos ripetita ankaŭ ĉi-jare, dum la IJK en Israelo.

Aliflanke, la blogo (tejo.org/blogo/TT) silentis dum la plejparto de la jaro. Same ne estis evoluigita kaj restis en formo de kruda ideo la kunlaboro kun Muzaiko pri voĉaj materialoj.

Tiujn ĉi du aspektojn laŭ mi indas evoluigi kaj prizorgi, kaj por tio la redaktoro bezonas helpon de pliaj teamanoj serĉendaj, kio ankoraŭ ne estis farita.

TEJO-aktuale

Sub la redaktado de Julia Noe, TA aperas preskaŭ ĉiun semajnon, kutime vendrede (kvankam daŭre difinita kiel du-semajna informilo). Laŭ la gvidlinioj evoluigitaj lastjare, plej unue aperas informoj pri TEJO, poste junularo-rilataj kulturaj informoj, poste detaloj pri specifaj renkontiĝoj kaj ĝeneralaj kontribuoj. Ĉiu numero de TA estas voĉlegata de Petra Smidéliusz por la retradio Muzaiko (muzaiko.info/programeraj).

El la vidpunkto de ĝisdatigo de la mastruma sistemo kaj grafika aspekto de TA ne okazis multa progreso, bedaŭrinde. Tio postulas tempon – ĉu mian, ĉu de alia persono kiu farus la teĥnikan laboron (dum trovi tian alian personon ankaŭ necesigas tempoinveston). La aktuala plano estas, ke post la fino de mia oficperiodo kaj aliaj devoj al TEJO, mi prizorgu tion dum la 3-a kvaronjaro de 2013.

Retpaĝaro

En septembro kaj oktobro 2012 Daniel Bebelacqua, la programisto de Pasporta Servo, ĝisdatigis la sistemon funkciigantan la retejon (Drupalo) al la plej lasta versio. Tio unuflanke igis la retejon multe pli facile mastrumebla, sed aliflanke gvidis la tutan enhavon al lingva kaĉo. Ĉar la novaj versioj de Drupalo havas alian manieron katalogigi lingvan enhavon ol la kaduka versio kiun ni uzis antaŭe, ĉiuj artikoloj intermiksiĝis. Sekve en la postaj monatoj mi investis signifan tempon por ordigo de la enhavo kaj ĝia ĝusta katalogigo laŭ lingvoj. Samtempe okazis ĝisdatigado de pluraj paĝoj. La laboro estis preskaŭ kompletigita, kiam okazis neatendita kaj stranga paneo en la sistemo, pro kiu ne plu eblis alŝuti dosierojn nek administri la menuojn. Efektive, en ĉi tiu momento ĉiuj menueroj kiuj devus aperi en la maldekstra kolumno, ŝvebas ie ĉe la supro de la paĝo.

Ĝis nun ne estis trovita solvo por tiu ĉi paneo. Kiel sekvo restis nefinita la ordigo de la enhavo; krome, ne estis komencita la antaŭe planita tradukado de la enhavo (kaj ĝisdatigo de la ekzistantaj tradukoj). Zorgo pri tiu ĉi paneo kaj restarigo de normala funkciado de la retejo devos esti inter la unuaj traktendaj aferoj en la nova oficperiodo.

Inform-materialoj

Dum tiu ĉi periodo estis pretigitaj du informiloj: unu strikte pri TEJO, en formato A5, dulingva. Ĝi estis origine farita por la ICMYO-renkontiĝo en Kairo, Egiptio, en la araba kaj angla lingvoj, kaj ekde tiam tradukita al la franca, hungara kaj indonezia. Ĝia formato ebligas kombinon de ajnaj du lingvoj.

La alia informilo fakte estas ŝablono por tradukado al la naciaj lingvoj. La celo de ĝia kreado estis havigi al la landaj sekcioj kiuj ne havas siajn proprajn informajn materialojn pri Esperanto, ion facile realigeblan – nome, necesas nur sendi al TEJO la tradukojn. La konkretigado de la enhavo daŭris pli longe ol planite, kaj sekve nur en junio estis pludonita al Marta Wierzbowska, kiu prizorgis la aspektigon de la informilo. Ekde nun ĝi jam disponeblas por tradukado al la naciaj lingvoj.

Akcesoraĵoj

Kvankam aperis diversaj ideoj pri ‘mojosaĵoj’ de TEJO (butonoj, ĉapoj, skribiloj, notlibroj...?) finfine estis realigitaj nur tri: la T-ĉemizo de TEJO mem, por kiu okazis konkurso de grafikaĵoj kaj estis elektitaj 3 dezajnoj, kaj la T-ĉemizo de *Kontakto*, en varianto kun amuza bildo kaj en “pez-metala” varianto (nigra kun strikta skribaĵo). Por tiu ĉi de *Kontakto* estis unuafoje en Esperantujo proponitaj knabinaj senmanikaj ĉemizoj. La tria estas la TEJO-kondomoj, en diversaj gustoj kaj kun glumarko ‘TEJO protektas vin’. Ili estis disponeblaj en JES, IJF kaj IJK.

Resume

Kiel mi jam menciis en la enkonduko, kompare al la unua jaro de mia oficperiodo, tiu ĉi dua estis malpli produktiva. Malfacilas al mi diri ke mi tute kontentas pri la rezultoj kaj la atingiĵoj, eĉ se aperis objektivaj obstakloj pri tempo-disponeblo. Grava konkludo, jam esprimita de mia antaŭulo, Oleksandra Kovyazina (Sasha), estas ke la informada fako havu teamanojn; sed tio ne sufiĉas. La sperto akirita dum tiuj ĉi du jaroj substrekas, ke por la estrarano pri informado tre gravas esti bona team-gvidanto scianta trafe mastrumi la disdividon de la taskoj en tiu ĉi vasta laborkampo. Mi aŭdigas la esperon, ke mia posteulo kapablos tion pli bone ol mi.

Eksteraj rilatoj

raportas Michael Boris Mandirola, dua vicprezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj

Eksteraj rilatoj plu konfirmiĝas aktiva agadkampo de TEJO kaj en la koncerna komisiono, KER, aktive kontribuas diversnivele manpleno da valoraj aktivuloj kiuj permesas fruktodonan plurfrontan agadon.

Tre aktiveca kadro estas la Forumo Junulara Eŭropa kaj pluraj TEJO-aktivuloj partoprenis aktive ĝiajn eventojn. En septembro 2012 Francesco Maurelli partoprenis kunvenon pri la FOJE-laborplano en Bruselo. En novembro 2012 okazis la Ĝenerala Asembleo de FOJE, tie partoprenis 3 TEJO-delegitoj: Nico Huurman, Veronika Poór kaj Krishna Sivillà Rubio, tie estis intervjuitaj preskaŭ ĉiuj kandidatoj al la FOJE-estraro, kaj krome en politikdokumento pri junularaj rajtoj ili sukcesis aperigi la “rajton lerni sian denaskan lingvon kaj lingvon kiu ebligas justan internacian komunikadon”. En decembro 2012 pri la temo de junularaj rajtoj estis ankaŭ trejnado en Helsinko, kiun partoprenis Veronika Poór. Rilate la junularajn rajtojn, sed rande de FOJE, Veronika ankaŭ partoprenis kun Rogier Huurman la eventon de AEGEE en Strasburgo kie interalie ili aranĝis fulmokuson de Esperanto.

Alia FOJE-kampo en kiu TEJO aktivis dum la lastaj jaroj, ĉefe danke al la laboro de Francesco Maurelli, estas la rilatoj kun Ĉinujo: en marto okazis la 4-a EU-Ĉina Simpozio pri Junulara Laborevoluigo, kiu flanke de EU konsistis el la delegitaro de Eŭropa Junulara Forumo. Tie estis eĉ du delegitoj de TEJO (inter la entute 12–14 delegitoj de la ĉirkaŭ 100 FOJE-membroorganizoj): Francesco Maurelli kaj Judith Meyer; tio signifas agnoskon de sukcesa laboro kaj partoprenon de du valoregaj aktivuloj, kiuj altnivele povis reprezenti TEJO-n kaj Esperanton en la delikata kunteksto kiel la ĉina, renkontante aktivulojn kaj institucianojn. Ili cetere faris gravan mondonacon al TEJO, konsekvence de tiu evento.

En aprilo okazis FOJE-membrokonsilio kie TEJO-n reprezentis denove Veronika Poór kaj Nico Huurman kaj tie TEJO akceptiĝis kadre de la grupo de interŝanĝaj organizoj. Fine de junio Manuela Ronco ĉeestis la Ĝen-Sek-Tagon, kie ŝi havis la okazon lerni kaj kompari TEJO-n al aliaj organizoj.

Tra FOJE ankaŭ okazis partopreno de Veronika Poór kaj Sarolta Bagó en la kunveno prepara por la kreiĝo de nacia junulara konsilio en Hungarujo, en kiu HEJ potenciale povus membri. Krome, TEJO estis ankaŭ reprezentita en la eventego Yo-Fest, kie partoprenis nome de TEJO Irina Gerasimova.

KER-kadre grava atingo estis la repartopreno de delegito (mi mem) en la jara kunveno de ICMYO, kiu okazis en Kairo. Certe estas grave, ke TEJO ĉeestis kaj sin montris aktiva parto de tia organizaro. Krome eblis dum retuma tago prezenti Esperanton kaj nian agadon ankaŭ al la lokaj egiptaj organizoj kaj renovigi la kontakton kun la aliaj junularaj organizoj. La ĉefa bedaŭrinda afero estis la neeblo miaflanka taŭge postumi ĉiujn ricevitaĵajn kontaktojn por la kreiĝo de signifaj kunlaboroj.

En oktobro 2012 alia monda evento havis TEJO-partoprenanton: la Konsilio de Eŭropo, Eŭropa Junulara Fondaĵo kaj Eŭropa Junulara Centro aranĝis la Junularasembleon 2012 – Junularo kaj Demokratio, kie TEJO-n reprezentis Carlos Hernandez.

Alia kampo umita estas daŭripova evoluo: Rafael Henrique Zerbetto sekvis post-Rio+20-ajn diskutadojn, ĉefe ĉe la retforumo World We Want 2015, kun diskutoj pri daŭripoveco, respondis al pluraj enketoj kaj ankaŭ sekvis retlistojn rilatajn al daŭripoveco, post-Rio+20-aj aferoj kaj de MGCY – ĈefGrupo por Infanoj kaj Junularo de UN. Rafael Henrique Zerbetto estis ankaŭ la TEJO-kontakto de la Projektego kaj en decembro 2012 li, kun helpoj mia kaj de Veronika Poór, preparis tekston por filmeto kiun li mem registris, kaj kiu estis montrita en la sidejo de UN okaze de la evento organizita de la Projektego. Rafael havis 5 minutojn por paroli pri Esperanto kaj la filmeto estis montrita al la tuta mondo per reta televido.

Estis ankaŭ umo kun Unesko: plurlingva koncerto de la duo KAJ (la famaj francesperantaj muzikistoj Gijom' kaj Melono) en Parizo eniris la oficialan programon de Unesko pri ĵazo danke al la propona kaj organiza laboro de Veronika Poór kaj KAJ.

Fine de marto 2013 okazis la fondiĝo de FEDI, reto de organizoj por interkulturo. TEJO estis tie reprezentita de Veronika Poór kiu faris bonegan laboron signife kontribuante kaj estante elektita estrarano. Tamen, laŭpropone de Veronika mem, TEJO decidis ne aniĝi oficiale, ĉar temas ĉefe pri malgrandaj kaj mezgrandaj lokaj organizoj, do tute malsamaj de internacia organizo kiel TEJO. Tamen kelkaj el la tie kreitaj kontaktoj estas postumataj kaj ekkreiĝadas kunlaboro inter kelkaj lokaj Esperantaj organizoj kaj ne-esperantistaj organizoj ekkonitaj tra FEDI.

Rigardante estontecen, estas alia projekto nuntempe kuirata: Judith Meyer preparis projekton pri malplimultecigitaj lingvoj kiu enhavus la uzon de Esperanto kaj estas freŝa novaĵo ke ĉi-oktobre ŝi prezentos ĝin kadre de Rodisa Junulara Forumo, kie ni esperas ke ĝi sukcesos gajni monsubtenon.

Informado priKER-a estis tra *TEJO tutmonde* kaj aparte sukcesis la artikolo pri la ĉinaĵo (kiu gajnis la unuan paĝon de la revuo *Esperanto*). Krome okazis KER-aĵoj dum Esperantorenkontiĝoj: dum JES okazis programeroj pri volontulaj rajtoj (pri kio ekzistas Esperanta

versio: http://issuu.com/yomag/docs/volunteering_charter_es) kaj pri junularaj rajtoj (gvidataj respektive de Quentin Weber-Seban kaj Veronika Poór).

Grava problemo de KER nuntempe ŝajnas esti integriĝo de ĝia agado kun la cetero de la organizo. Estis ekzemple kontaktoj kun la Nacia Junulara Konsilio de Malto por komuna projekto cele al la fondiĝo de LS, kun skoltaj organizoj por adolesk-cela projekto kaj kun socialistoj por partopreno en ilia maja eventego. Nenio konkretiĝis: mankis komuna strategio de la organizo pri tio, kion ni volas atingi, mankis metodo por rapide pritrakti kaj priagadi, mankis homoj kun tempodisponblo por povi zorgi pri tiaj aferoj. Tio devas ŝanĝiĝi por vera progreso de Esperanto.

Ankaŭ menciinda estas la tre sekvinda kutimo de la membroj de KER, ke krom la artikoloj aperintaj en *TEJO tutmonde*, la aktivuloj de KER verkas detalajn raportojn post ilia partopreno en aranĝoj, kaj novuloj ricevas personan mentoradon kaj etan trejnadon, tiel ebligante efikan scitransdonon – verŝajne ankaŭ tio grave kontribuas al la tre serioza konsidero de TEJO en diversaj forumoj.

Edukado

raportas Petra Smidéliusz, estrarano pri landa agado kaj edukado

Ni havas bonan kunlaboron kun edukado.net, kio baziĝas ĉefe sur la interŝanĝo kaj diskonigo de novaĵoj, stipendioj kaj trejnadaj.

Post pluraj vanaj provoj mi fine rezignis pri kunlaborado kun la (tiam aktuala) Estraro de ILEI, sed mi opinias grava kaj necesa ekhavi aktivan kunlaboradon en la estonteco (eble tra la novelektita estro).

En julio 2012 ni lanĉis subvenci-projekton por premii la individuajn membrojn de TEJO kiuj trapasas la ekzamenon je nivelo C1 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro.

En 2012 entute 12 individuaj membroj de TEJO ricevis subvencion, en 2013 estis 7 kiuj petis, sed ni ankoraŭ ne konas la rezultojn de la ekzamenoj.

La 19 kandidatoj venas el la jenaj landoj: Rusio (4), Meksiko (4), Pollando (3), Kolombio (3), Usono (2), Argentino (1), Hungario (1) kaj Litovio (1).

Kongresoj

raportas Tina Tišljár, estrarano pri kongresoj

Mi raportos pri la laboro kiun mi faris dum la lasta jaro. Mi unue ŝatus enkonduki al la decidoj kiujn ni faris dum la lastaj jaroj. Dum mia estraraneco ni havis du ekstereŭropajn kaj sufiĉe specifajn IJK. Unue lastjare ni devis en ege malgranda tempo trovi anstataŭan landon por organizi IJK kaj tiu organizanto devis pretigi la kongreson ene de ses montatoj. Tio estis ege malfacila tasko. Kaj tiu ĉi IJK estis mia unua kiel estrarano. Mi ankaŭ mem estis lernanta kiel fari la laboron. Mi konscias, ke tial povus esti, ke okazis kelkaj malperfektaĵoj en la kongreso mem. Tamen, kiel tuto mi vere kontentas pri la rezulto en la cirkonstancoj.

Sekva IJK kiun mi superrigardas estas tiu en Israelo. Venis tri kandidatiĝoj kaj surpapere, en la cirkonstancoj en kiuj ni estis kiam ni estis decidantaj, la plej bona kandidato estis Israelo. En la okazo kiam UK okazas en Islando simple ne eblas elekti proksiman landon. Ankaŭ post IJK en Kubo kaj IJK en Vjetnamo, kie ni vidis ke multaj junuloj en la landoj kie IJK okazis ege multe profitis de la kongreso, ni havis la politikon, ke Eŭropo jam havas grandegajn eventojn kelkfoje jare kaj ni volas doni la okazon al pli foraj landoj profiti de TEJO. Kaj tio estis komuna estrara decido.

Tamen, kiel ofte okazas, ne ĉio povas perfektigi – kaj la teamo kiu kandidatiĝis por okazigi IJK en Israelo pro diversaj personaj kialoj draste malgrandiĝis. Ni sufiĉe involviĝis, sed pro diversaj kialoj la kongreso mem ne estos vere granda kaj mi persone ne opinias tion malbona. Mi ŝatus laŭdi Sergeon pro lia grandega laboro en tiu kampo.

Kaj jen do pli konciza raporto. La publikigo de la aliĝilo en la reto de la ĉi-jara IJK malfruis multe pro du kialoj – unua estis malbona aranĝo kun la kongresejo, pro kio oni devis ŝanĝi urbon al Nazareto. Dua estis, ke oni dum pluraj monatoj laboris por starigi bonan bazon kaj aliĝan sistemon, kiun oni povus uzi por la sekvaj IJK. Mi pensas, ke tio estas grava afero kaj multege helpas al la sekvaj kongresaj komitatoj.

En tiu ĉi jaro ni finpreparis du ilojn por helpi al organizantoj de eventoj. Je la komenco de mia estraraneco mi volis ciferecigi kaj disvastigi la “Manlibron pri oranzado de eventoj”, kiu estis originale skribita en 1972 kaj reviziita en 1984. Laŭ mia persona sperto ĝi estas ege bona helpilo. Ĝi estas malnova, sed la reguloj pri oranzado de eventoj ne tiom ŝanĝiĝis esence.

La dua dokumento kiun ni finpreparis kaj disvastigis estas la “Superrigardo de taskoj por eventoj”. Temas pri projekto kiun komencis Łukasz Żebrowski, Rolf Fantom kaj mi antaŭ pluraj jaroj. Ĝi ankaŭ estas helpilo kiu celas helpi al malplispartaj organizantoj starigi teamon, havi pli bonan ideon kiujn taskojn oni devas fari kaj kiam.

Kion ni ankaŭ sukcesis fari estas, ke ni malfermis la alvokon por organizi IJK antaŭ la kongresa sezono por doni la okazon dum la aranĝoj renkontiĝi kaj kunhelpi plani kandidatiĝojn kaj fari tiom pli bonajn projektojn por samtempe havi sufiĉe da tempo por serĉi subvenciojn, aranĝi aferojn kun la ejoj, fari buĝetojn kaj simile.

Kaj por la fino mi ŝatus raporti pri la bonega progreso de la brazila kongresa komitato, kiu faras vere bonegan laboron kaj mi antaŭvidas bonegan IJK en Fortalezo.

Aktivula trejnado kaj seminarioj

raportas Nico Huurman, tria vicprezidanto kaj eksa estrarano pri aktivula trejnado

La kreado de la Aktivula Datumbazo bedaŭrinde ne progresis ekde pasinta jaro. La aktivulo Clemens Fries ne plu havis disponeblan tempon kaj ni serĉas nun alian programiston, kiu eventuale povus transpreni la taskojn.

Dum la Junulara E-Semajno en Naumburg ĉirkaŭ la novjaro 2012/2013 okazis trejnseminarieto pri oranzado de sukcesa aranĝo. Ĝi konsistis el kvin partoj: kunordigo de teamo, buĝetado, kunmetado de programo, grafikado de varbiloj kaj oranzado de trinkejo.

La plano organizi seminarion kun AEGEE ne realiĝis, ankaŭ la dua subvencipeto estis rifuzita.

La komisiono pri Aktivula Trejnado estis kreita, sed ankoraŭ ne aktiviĝis bedaŭrinde. Mi certas, ke la nova estrarano pri AT entuziasme transprenos la laboron.

Volontulo

raportas Quentin Weber-Seban, volontulo

La volontulo Natalia Antolak (Pollando) daŭrigis en sia posteno ĝis la fino de aŭgusto 2012, kiam ŝi estis anstataŭita de Quentin Weber-Seban (Francio). La oficisto Manuela Ronco (Italio) prizorgis la transdonon de spertoj dum la unua semajno de septembro 2012, sed ankaŭ per ofta reta komunikado dum la sekva periodo.

La TEJO-volontulo okupiĝas pri la ĉiutaga oficeja administrado kaj pri la kontaktoj ene kaj ekstere de la organizo. Tio inkluzivas la pritraktadon de la poŝto, papera kaj reta, kaj la respondadon al la demandoj kaj petoj de la membroj, aktivuloj aŭ eksteruloj. La volontulo respondecas ankaŭ pri la komunikoj pere de la Facebook- kaj Twitter-kontoj de TEJO, kaj parte pri la publikigado de la novaĵoj en tejo.org. Krome, li/ŝi ofte kunordigas kaj superrigardas la laboron de estraranoj, komisiitoj kaj aliaj aktivuloj, plifaciligante la komunikadon inter ili, memorigante taskojn kaj limdatojn, kaj ankaŭ estante la ĉefa kontaktpunkto kun la CO en Roterdamo. Dum la fizikaj kaj retaj kunsidoj ŝi/li verkas la protokolojn kaj la taskolistojn.

Kadre de Pasporta Servo, la Oficejo havas kunrespondecon pri administrado de la retadreso pasportaservo@tejo.org kaj info@pasportaservo.org. Ĝi ankaŭ ricevas la paperajn aliĝilojn, kaj konsekvence traktas ilin, membrigante tiujn gastigantojn en la retpaĝon. Multe da laboro postulis la pretigado de la nova adreslibro, kiu reaperas post du jaroj. Mi helpis redakti la datenojn, kaj nun provlegas la finan version por eldono.

Grava parto de mia laboro ankaŭ estis la pretigado de la raporto necesa por ricevi la administran subvencion de la Eŭropa Unio de 2011. Pro la ŝanĝo flanke de la Eŭropa Komisiono, oni devis kompili pli da informoj ol unue demandite. Mi sekve helpis Manuela Ronco kaj Nico Huurman, la oficisto kaj kasisto de TEJO, en la kompilado, kunordigado, printado de ĉiuj fakturoj pagitaj de TEJO en 2011. Antaŭnelonge tiu fina raporto estis akceptita.

Koncerne la rilatojn inter la landaj sekcioj kaj TEJO, la volontulo ĉi-jare partoprenis en la kolektado de informoj por la enketo KODEJO 2012. La respondoj al tiu ĉi enketo estis uzataj por ĝisdatigi la informojn pri TEJO kaj ĝiaj LS-oj aperantaj en la Jarlibro de UEA.

Cetere, la volontulo partoprenas en la vivo de la Centra Oficejo de UEA kaj de tempo al tempo helpas pri komunaj taskoj. Tial, la volontulo regule voĉlegas artikolojn de la revuo *Esperanto* por dissendo al blinduloj. Mi ankaŭ aĉetis novan oficejan komputilon. La antaŭa, iu portebla Mac-komputilo, estis aĉetita antaŭ ses jaroj kaj multaj programoj ne plu estis ĝisdataj. La TEJO-oficejo nun havas pli potencan komputilon, kiu funkcias kun Vindozo kaj Linukso. La agadoj ene de la CO inkluzivas ankaŭ la partoprenon en la Malferma Tago, kaj la reprezentadon de TEJO tie.

Mi ankaŭ ĉeestis nome TEJO en pluraj eventoj de la Forumo de Junularo Eŭropa, pri la nova subvenci- kaj financkadroj, aŭ en la laborgrupo pri volontulado, en kiu mi jam anis antaŭ komenco de mia volontulado. La volontulo reprezentas la organizon ankaŭ ene de la movado, okaze de diversaj aranĝoj. Dum la ĉi-jara JES, mi aranĝis la TEJO-budon por doni informojn al la partoprenantoj kaj kolekti aliĝojn kaj abonojn. Ankaŭ estis sukcese lanĉita la nova TEJO-varbkampanjo “TEJO protektas vin”, kun disdono de kondomoj. Dum la sama evento mi ankaŭ partoprenis la TEJO-seminaron pri organizado de aranĝoj, kiu ankaŭ multe plaĉis al la partoprenantoj.

Aldone, nuntempe okazas preparoj por la someraj aranĝoj, precipe la IJK en Nazareto, kie interalie kunvenos la Komitato de TEJO, kaj la UK en Rejkjaviko, kie mi helpos la kongresan teamon. Mi tie ankaŭ kunprezentos TEJO-n kaj akceptos la Patronojn de TEJO. Mi poste transdonos la postenon al Rogier Hurman.

Mi trovis dum mia tempo kiel volontulo ekzakte tion, kion mi serĉis: plentempan laboron por Esperanto. Mi laboris memstare, kvankam mi neniam sentis min forlasita. La oficistoj de UEA kaj Manuela Ronco kiel la oficisto de TEJO ĉiam pretis helpi min kaj respondi al miaj demandoj. La rilatoj kun la Estraro kaj kun la aktivuloj de TEJO ankaŭ ĉiam estis helpaj kaj amikaj. Mi ne povintus fari multe sen tiom da diversaj subtenoj. La laŭdoj, kiujn mi ricevis, ankaŭ multe kuraĝigis min. Ĉiu konsilo, eĉ kritika, plie estas granda helpo por la organizo.

Mi ankaŭ havis multe por fari kaj devis bone organiziĝi. Kiam mi havis grandan taskon farendan – ekzemple redakti protokolon – mi ne devis neglekti la pli etajn taskojn kiel respondi al la retmesaĝoj, kaj inverse, tiuj etaj taskoj ne povis ĝeni plenigadon de la pli grandaj. Mi pro tio multe lernis, kaj ankaŭ multe spertiĝis pri la laboro en organizo, laboro en grupo kaj meminciata laboro.

Oficisto

raportas Manuela Ronco, oficisto

Je la fino de mia dua jaro kiel oficisto de TEJO, feliĉe mi povas diri ke mi taksas ĝin iom pli pozitive ol la unuan, eĉ se daŭre restas multaj plibonigendaĵoj kaj defioj.

Pozitiva aspekto estis relative bona kaj efika komunikado kun la volontulo Quentin Weber-Seban, kiu ekde la komenco diligente okupis sian postenon en la oficejo. Mia fizika malĉeesto kaj, sekve, la neevitebla nur-reta kontakto, restas unu el la plej problemaj aspektoj de la kunlaboro. Aldone, la kutima ĝenerala malsperto de la junaj volontuloj igas ilian superrigardon kaj instruadon unu daŭre grava parto de mia taskaro. Por plifaciligi ĝin, mi iom post iom aldonas al la Estrara Vikio instrukciojn pri diversaj taskoj, kaj lastatempe provis la funkciadon de la komputila sistemo por mastrumado de teamoj, kiun mi ŝatus ekde la alveno de la sekva volontulo.

Alia ĉefa ero de mia taskaro estas la verkado de subvencipetoj kaj esplorado pri diversaj subvenciebloj. Dum la pasinta jaro grandan laboron postulis la komunikado kun EACEA pri la du administraj subvencioj de Youth in Action por la jaroj 2010 kaj 2011, kies pagoj estis haltigitaj pro duboj pri la rilato inter TEJO kaj UEA, kaj pri ĝia partopreneblo en la subvencipeta kadro. Feliĉe, finfine la Eŭropa Komisiono agnoskis, ke TEJO havas juran personecon kaj ke tio sufiĉas por ricevi la subvenciojn. Tamen, ili postulis amendojn de nia

kontrakto kaj sendadon de raporto laŭ la buĝeta metodo, anstataŭ tiu (pli simpla) laŭ la sistemo de fiksjaj sumoj. Tiu laboro ankaŭ estis tre pena kaj temporaba.

Daŭris ankaŭ la klopodoj akiri la akrediton kiel gastigaj organizoj de la Eŭropa Volontula Servo, kaj por TEJO, kaj por NEJ. Dum por NEJ ni ricevis dufoje rifuzon de la nederlanda agentejo, la eŭropa agentejo (ankaŭ ĉi tie post longa kaj malfacileta komunikado) lastatempe sciigis, ke TEJO estis aldonita al la datumbazo de la akredititaj EVS-organizoj.

Kroma sukceso estis la aprobo de la subvencio fare de la Eŭropa Junulara Fonduso, por la seminario pri genraj identeco kaj egaleco, kiu okazos en aprilo 2014 en Italio, kadre de la Internacia Junulara Festivalo.

Projekto por trejnado pri debatado dum IJK estis ankaŭ sendita al Open Society Foundation, sed ĉi-momente ankoraŭ ne venis reagoj.

Bedaŭrinde, ne ricevis aprobon, aŭ ne estis sukcese senditaj, la sekvaj projektoj pri kiuj mi ankaŭ okupiĝis:

- trejnseminario pri multilingvismo kaj lingvopolitiko, kunlabore kun AEGEE, en la subvencikadro de la Eŭropa Junulara Fonduso;
- projekto, en la kadro de Youth in Action, pri aktivula trejnado, pri antaŭenigo de novigado kaj kvalito en la volontula laboro;
- trejnseminario, en la kadro de Youth in Action, pri organiza mastrumado (sendita por Nederlando kaj rifuzita, kaj ne sukcese sentita por Brazilo);
- skolta projekto, en la kadro de Visegrad Foundation (ne sendita pro manko de partneroj).

Krom pri subvencioj, mi de tempo al tempo okupiĝas ankaŭ pri diversaj taskoj, laŭ la momentaj bezonoj kaj laŭ mia tempodispono. Interalie mi diversmaniere okupiĝis pri varbado, ekzemple sekvante la kampanjon “TEJO protektas vin”, kaj tiun pri la 50-jariĝo de *Kontakto*. Rilate al la fako de Aktivula Trejnado, mi kunorganizis kaj kuntrejnus en la “Trejnado pri organizado de eventoj”, dum JES en Naumburg, kaj same faros dum FESTO, kun trejnado pri kunlaboraj ludoj. Mi ankaŭ daŭre sekvas retlistojn kaj datumbazojn por trovi interesajn trejnadojn aŭ internaciajn eventojn ekster Esperantujo, kaj regule disvastigas ilin pere de niaj informkanaloj.

Ĝenerale mi ĝojas pri la kelkaj sukcesoj atingitaj, kaj pri la okazo, dum la jaro, esplori ankaŭ diversajn subvenci-programojn, aliajn ol tiuj jam konataj de TEJO. Aparte inspira kaj instrua estis ankaŭ mia partopreno en la Ĝen-Sek-Tago kaj en la Ateliero pri monakirado, kadre de la Junulara Akademio de Forumo de Junularo Eŭropa.

Aliflanke mi bedaŭras esti ankoraŭ spertinta tro da komunikaj malfaciloj, rezistoj kaj malkunlaboremo dum mia ĉiutaga laboro. Por esti efika kaj utila, projektumado devas esti nepre kunlabora ago. Necesas komune difini la celojn, realisme taksii la rimedojn, varbi (kaj varti) homfortojn, kunmeti malsamajn kompetentojn, kreive kuncerbumi, rapide reagi al la petoj, ankaŭ kiam temas pri tedaj burokratiaĵoj.

Profesiigi la agadon de volontula asocio ne signifas simple pagi homo(j)n por ke (i)li faru la laboron, malpezigante la devojn kaj la respondecojn de la aliaj.

Nuntempe al TEJO ankoraŭ mankas kaj strategio, kaj sinergio inter la diversaj agantoj. Mi kredas ke estontece mi devos multe pli strebi helpi la asocion tiuflanke, ĉar nur tiel mia laboro povas alporti daŭripovan pliboniĝon.

Komitato de UEA

raportas Nico Huurman, kasisto, komitatano A de UEA por TEJO

Dum la kunsido de la Komitato de UEA en la 97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo reprezentis TEJO-n Michael Boris Mandirola kaj Gabriele Corsetti. Ankaŭ ĉeestis nia ĝenerala sekretario Paweł Fischer-Kotowski, kiel reprezentanto de Pola Esperanto-Asocio.

La Komitato de UEA akceptis la proponon de la Komitato de TEJO pri la ŝanĝoj en la Regularo pri TEJO.

Dum la jaro Nico Huurman estis parto de la Elekta Komisiono de UEA. Li kontribuis al la komisiono per sugestoj pri pli junaj eblaj kandidatoj por la venonta Estraro de UEA.

Pasporta Servo

raportas Paweł Fischer-Kotowski, ĝenerala sekretario

Pasporta Servo estas konata tra la tuta Esperanto-movado, en ĉiuj landoj kaj aĝ-kategorioj. Ĝi estas vaste utiligata en la poreksteraj informado, kvankam pli kaj pli da homoj uzas – aldone aŭ anstataŭe – similajn neesperantajn servojn, destinitajn por ĝenerala publiko.

Ĝis la 2010-aj jaroj PS aperis libroforme regule preskaŭ ĉiujare, dank' al la sindediĉa laboro de Derk Ederveen, la PS-prizorganto en la jaroj 1995–2008. La lastan fojon la surpapera listo aperis meze de la jaro 2011 kaj ĝi estis unu el la furoraĵoj de tiu jaro, okupante la duan lokon en la listo de la plej amase vendataj varoj de la Libro servo de UEA. Ankoraŭ en 2012 ĝi troviĝis en la unua deko de la listo, kio konfirmas kiom tiu servo daŭre estas bezonata.

La retpaĝo pasportaservo.org estis inaŭgurita en 2009. Kreis ĝin kaj daŭre teknike prizorgas Daniel Bebelacqua. Bedaŭrinde, la retpaĝo – kvankam plenfunkcia – ne atingis kontentigan uzo-nivelo kaj plejparto de la laboro daŭre estas farata permane de volontuloj, precipe Alexandre Baudry kaj Quentin Weber-Seban. Nuntempe estas pretigata la nova papera eldono, kiu devus esti eldonita ankoraŭ en 2013.

En 2012 aperis diversaj proponoj rilate al la estonteco de PS, inkluzive de ĝiaj malfondo, forlaso kaj fordonado. La Komitato de TEJO en reta voĉdono tamen decidis pri pluvivigo kaj pluevoluigo de Pasporta Servo.

En pasportaservo.org estas nun registritaj 3285 uzantoj el 99 landoj, el kiuj 1645 gastigantoj (iom pli ol 50%).

Adoleska agado

raportas Manuela Ronco, oficisto kaj provizora respondeculo pri adoleska agado

Bedaŭrinde, malgraŭ la ĉeesto en la retlisto de kelkaj membroj, neniam troviĝis gvidanto por la komisiono, kiu nuntempe dormas. Malgraŭ tio, lastatempe ekkonkreteĝis projekto kiu estis en la originaj planoj kiam la grupo kreiĝis, nome la vikio pri ludoj (<http://www.tejo.org/vikio/Ludoj>). Pri ludoj Manuela Ronco estas ankaŭ pretiganta trejnadon, okazontan dum FESTO, kaj artikolon por *Kontakto*.

TEJO-aktuale

raportas Julia Noe, redaktoro de TEJO-aktuale

TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO. TEJO-aktuale estas senpage abonebla, aperas 2-semajnrirme kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj. TEJO-aktuale estas abonebla retpoŝte (<http://www.uea.org/retlistoj>) kaj legebla en la retpaĝo (<http://www.tejo.org/ta>). Kontribuoj ĉiam estas bonvenaj per la retformularo en la retpaĝo aŭ retpoŝte al tejo-aktuale@tejo.org.

Aktuale alvenas tiom da novaĵoj, ke la informilo povas aperi preskaŭ ĉiusemajne, depende de la tempo de la redaktoro.

Kelkaj aferoj, kiuj povus esti plibonigitaj:

- Mi daŭre uzas la retaliron de mia antaŭulo por enmeti la aktualan eldonon en la retpaĝo tejo.org/ta, ĉar ĝis nun neniu sukcesis krei propran konton por mi.
- TA devus esti elektronike arkivigata de TEJO, sed mi ĝis nun ne ricevis informon kie kaj kiel.
- En la retpaĝo tejo.org/ta ankoraŭ estas la malnova marko de TEJO kaj varbkampanjo por *lernu!*, kies marko ne funkcias.
- La kontaktilo en la retpaĝo tejo.org/ta sendas al aktuale-red@tejo.org, kiu daŭre estas spamata, ĝi prefere sendu al tejo-aktuale@tejo.org.
- La presfunkcio en la retpaĝo ne plu funkcias.

Statistikoj pri TEJO-aktuale de 14.07.2013

Retpoŝtaj abonantoj: 745

La nombro de la retpoŝtaj abonantoj restis sama kompare kun la antaŭa jaro.

La paĝaron vizitis entute (ekde 2004-04-26): 12465 personoj

Entute la paĝoj estis ŝarĝitaj (ekde 2004-04-26): 536177 fojojn

Paĝoj, de kiuj plej ofte venas la vizitantoj:

<http://search.live.com/results.aspx?q=aktuale> – 309 fojojn

<http://www.tejo.org/t-a> -276 fojojn

<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp> – 228 fojojn

<http://www.tejo.org/> - 189 fojojn

<http://search.live.com/results.aspx?q=aktuale&form...> - 115 fojojn

<http://esperanto-panorama.net/unikode/legu.htm> – 110 fojojn

<http://search.live.com/results.aspx?q=aktuale&mrt=...> - 94 fojojn

http://www.lernu.net/kursoj/kk_zam/postvortoj.php - 93 fojojn

<http://www.tejo.org/node/9> - 81 fojojn

<http://esperanto.memlink.ca/> - 78 fojojn

<http://tejo.org/t-a> – 66 fojojn

TEJO tutmonde

raportas Szabolcs Szilva, redaktoro de *TEJO tutmonde*

Ĉi tiu raporto priskribos mian agadon rilate al la redaktado de *TEJO tutmonde* kaj la artikolojn aperintajn en la menciita tempoperiodo.

Mi ekagis kiel redaktoro la 10-an de februaro 2012. La raporto priskribas la periodon ekde julio 2012 ĝis junio 2013.

Al la revuo *Esperanto* mi enigas kutime artikolojn, kiuj estas la plej gravaj el la vidpunkto de ĝenerala abonanto sendepende de la aĝo. Ĉi tion mi ankaŭ planas tiel daŭrigi estontece. En la septembra numero mi planas aperigi raporton pri la junulara programo de la UK.

Al *Kontakto*, ankaŭ laŭ la antaŭaj planoj, mi enigas artikolojn iom malpli gravajn por la tuta movado, sed tiom pli signifajn por la junularo: raportojn pri malpli gravaj eventoj, pri elstaraj, sekvindaj junularaj agadoj por Esperanto: informojn pri ebloj por junuloj por vojaĝoj, volontulado, studebloj ks. Laŭ la antaŭa interkonsento kun Łukasz Żebrowski, aperadas en preskaŭ ĉiu numero *Rubriko de la prezidanto*, kiu enhavas raporton de la prezidanto de TEJO por ĝia membraro pri la ĉefaj novaĵoj. Mi planas sekvi en la estonteco ĉi tiun skemon. Krome mi planas aperigi kelkajn artikolojn pri lingvouzo kiuj komparos la bonstilan kaj la nunan junularan uzojn. Mi volus atentigi pri kelkaj eraroj, kiuj oftas nuntempe inter la junuloj. La aperigo de informoj pri nekutimaj landaj sekcioj fiaskis pro la nerespondo, nekunlaboremo aŭ pigreco de la koncernaj landaj sekcioj.

En la blogo de TT mi enmetis lastatempe ne multajn artikolojn. Fakte, tiuj estas la raportoj pri IJK aŭ tiuj, kiuj estas tro longaj, konsistas el pluraj partoj. Estis la plano tien enigi ankaŭ la malplej gravajn artikolojn, sed fine tion mi ne faras. Aŭ ĉar malbonajn artikolojn mi simple ne lasas aperi, aŭ ĉar ne estas tiom da kontribuoj, ke mi abunde povu ĉion plenigi. Mi havas kelkajn konstantajn kontribuantojn, kiujn mi tre dankas, sed ofte estas malfacile iun konvinki pri kontribuado por TT.

Dum IJK, mi planas en la blogo aperigi ĉiu-tagan informilon de la partoprenantoj de la kongreso. Bezonatos ja la kunlaboro de iu, verŝajne de unu el la gajnintoj de la konkurso Partoprenu IJK-on.

Jen la artikoloj aperintaj dum mia redaktado en la koncerna tempoperiodo:

Esperanto (unu artikolo en ĉiu numero, sume 11 jare):

— Szilva, Szabolcs; Tyirin, Sergeo: *Ĉu Pasporta Servo plu ekzistos?*, “Esperanto” nr-o 1260 (7–8), julio-aŭgusto, 2012

— Fischer-Kotowski, Paweł; Maĵosa, Karina; Tyirin Sergeo: *La 68-a Internacia Junulara Kongreso*, “Esperanto” nr-o 1261 (9), septembro, 2012

— La teamo de muzaiko; *Muzaiko: moderna, junstila retradio*, “Esperanto” nr-o 1262 (10), oktobro, 2012

- Zerbetto, Rafael Henrique: *Necesas kapablighi aktivulojn*, “Esperanto” nr-o 1263 (11), novembro, 2012
- Poór, Veronika: *Universitata Esperanto-Festivalo aŭ raporto pri tio, kiel la teorio realiĝas*, “Esperanto” nr-o 1264 (12), decembro, 2012
- Sivillà, Krishna: *La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO sukcese aktivas – raporto pri “ĜA de FoJE”*, “Esperanto” nr-o 1265 (1), januaro, 2013
- Viglási, Krisztina: *Junulara Esperanto-Semajno: Mia unua internacia Esperanto-aranĝo*, “Esperanto” nr-o 1266 (2), februaro, 2013
- Zerbetto, Rafael Henrique: *Tri sinsekvaj junularaj eventoj en Brazilo*, “Esperanto” nr-o 1267 (3), marto, 2013
- Szilva, Szabolcs: *Enmovadigu per semajnfinaj programoj*, “Esperanto” nr-o 1268 (4), aprilo, 2013
- Smidéliusz, Petra: *Vigliĝanta junulara movado en Bonaero, Argentino*, “Esperanto” nr-o 1269 (5), majo, 2013
- Ronco, Manuela: *IJF estis bona, malgraŭ ĉio*, “Esperanto” nr-o 1270 (6), junio, 2013
- Hurman, Nico: *Reprezentado de TEJO en Forumo de Junularo Eŭropa*, “Esperanto” nr-o 1271 (7-8), julio-aŭgusto, 2013

Kontakto (po kelkaj artikoloj en ĉiu numero, sume 6 numeroj jare):

- Żebrowski, Łukasz: *Rubriko de la prezidanto*; “Kontakto” nr-o 250 (2012:4)
- Szilva, Szabolcs: *Lingvoekzameniĝi ja indas*; “Kontakto” nr-o 250 (2012:4)
- Arató, Kocsárd Valér: *Disvastigo de Esperanto ankaŭ ekster Budapeŝto*; “Kontakto” nr-o 250 (2012:4)
- Szilva, Laura: *Alie, sed tamen Esperantie*; “Kontakto” nr-o 250 (2012:4)
- Hurman, Nico: *Somera universitato en Makedonio*; “Kontakto” nr-o 250 (2012:4)
- Żebrowski, Łukasz: *Rubriko de la prezidanto*; “Kontakto” nr-o 251 (2012:5)
- Mandirola, Michael Boris: *TEJO reprezentita en Egiptujo*; “Kontakto” nr-o 251 (2012:5)
- Fischer-Kotowski, Paweł: *La nekutima IJK en Vjetnamio*; “Kontakto” nr-o 251 (2012:5)
- Szilva, Szabolcs: *ARKONES el mia vidpunkto*; “Kontakto” nr-o 251 (2012:5)
- Weber-Seban, Quentin: *La Ĉarto pri rajtoj de volontuloj*; “Kontakto” nr-o 251 (2012:5)
- Żebrowski, Łukasz: *Rubriko de la prezidanto*; “Kontakto” nr-o 252 (2012:6)
- Hurman, Roĉjo: *Klaĉkunveno PostSomera*; “Kontakto” nr-o 252 (2012:6)
- García Gutiérrez, Ariadna: *JUSKA 2012: Defia bonaĵo*; “Kontakto” nr-o 252 (2012:6)
- Rodzianko Dorota: *Staĝo por kaj per Esperanto? Certe jes!*; “Kontakto” nr-o 253 (2013:1)
- Fischer-Kotowski, Paweł: *IJK vere internacia – Brazilo gastigos la kongreson en 2014*; “Kontakto” nr-o 253 (2013:1)
- Armide, Gijom’: *La sekvo de miprovi*; “Kontakto” nr-o 253 (2013:1)
- Zerbetto, Rafael Henrique: *Nova BEJO-Ataŝeo elektita*; “Kontakto” nr-o 253 (2013:1)
- Szilva, Szabolcs (red.) (originalo: Kurz, Rainer): *Mallonga filmo en Ukrainio gajnis la konkurson en Berlino*; “Kontakto” nr-o 253 (2013:1)
- Pataki, Zsófia: *Vintr-tempa E-aranĝo en Hungario*; “Kontakto” nr-o 254 (2013:2)
- Mansour, Ahmed: *Esperanto vivas ankaŭ en la araba Nord-Afriko*; “Kontakto” nr-o 254 (2013:2)
- Szilva, Szabolcs: *Ĉu IJK en Sirio?*; “Kontakto” nr-o 254 (2013:2)

La blogo:

- Fischer-Kotowski, Paweł; Maĝosa, Karina: *Raportoj de IJK nr-o 1* (2012): <http://www.tejo.org/eo/node/1455>
- Fischer-Kotowski, Paweł; Maĝosa, Karina: *Raportoj de IJK nr-o 2* (2012): <http://www.tejo.org/eo/node/1456>

— Fischer-Kotowski, Paweł; Małosa, Karina: *Raportoj de IJK nr-o 3* (2012):
<http://www.tejo.org/eo/node/14567>

— Fischer-Kotowski, Paweł; Małosa, Karina: *Raportoj de IJK nr-o 4* (2012):
<http://www.tejo.org/eo/node/1458>

— Fischer-Kotowski, Paweł; Małosa, Karina: *Raportoj de IJK nr-o 5* (2012):
<http://www.tejo.org/eo/node/1459>

— Szilva, Szabolcs; Weber-Seban, Quentin: *Quentin Weber-Seban, la nova volontulo* (2012):
<http://www.tejo.org/eo/node/1464>

Kontakto

raportas Rogener Pavinski, redaktoro de *Kontakto*

Ekde la 68-a IJK multo okazis en la kampo de redaktado de *Kontakto*. La plej grava aspekto estas la 50-jariĝo de la revuo, festata ĉi-jare, en 2013.

Dum tiu ĉi periodo aperis la numeroj 2012:4,5,6 kaj 2013:1,2,3. La ĉefredaktadon, korespondadon kun kunlaborantoj kaj la zorgadon de la retejo kaj sociretaj iloj plenumis Rogener Pavinski. La enpaĝigon faris Romulo Felicio sub la gvido de Rogener Pavinski. La provlegadon kaj korektadon volontule faris Rob Moerbeek en la CO de UEA.

Diversaj kunlaborantoj partoprenis per disvestemaj artikoloj. La ĉefartikoloj de la koncernaj numeroj tuŝis la jenajn temojn: *La stela scio* (“Kontakto” 2012:4); *Klaĉoj kaj populareco* (“Kontakto” 2012:5); *Senkaku X Diaoyu* (“Kontakto” 2012:6); *La mistera lingvo de la Okulistoj* (“Kontakto” 2013:1); *Mia malkovro de Japanio* (“Kontakto” 2013:2) kaj *Kanabo, bandito aŭ heroo?* (“Kontakto” 2013:3).

La konstatataj kunlaborantoj por ĉiuj numeroj estis: *La Blaga Blogo* (Victoro Solé kaj Simmon Keith Barney), *Tiel la mondo...* (István Ertl) kaj *TEJO tutmonde* (Szabolcs Szilva). Nova rubriko aperis en 2013: *Vasovia Vento*, en kiu la brazilaj ĝemelfratoj Régis kaj Rangel Gotardi komentas la enhavon de la elsendoj de la pola podkasto. La intervjuo rubriko ricevis la gastojn: Eterne Rima, Peter Baláž (en 2 numeroj), Wang Shansan, Gianfranco Molle kaj Renato Corsetti. Ĉiujn intervjuojn faris Rogener Pavinski.

Por celebri la 50-jariĝon de la revuo TEJO produktis la T-ĉemizojn de *Kontakto*. Ni preparis specialajn varbbildojn por tiu okazo. Ankaŭ kadre de la 50-jariĝo, la Jubileanta *Kontakto* ekaboneblis rete, sen ricevo de la presita revuo, kiu ricevis duoble pli da koloraj paĝoj ol antaŭe, sume 16!

Pro altiĝo de la sendokostoj, la presado de la numeroj el 2013 translokiĝis el Pollando al Nederlando. La paper- kaj preskvalito bonŝance pliboniĝis.

La enpaĝigo ricevis novan grafikdezajnon, pli belan kaj malpezan; kaj aperis nova speciala rubriko: *Kontakto 50-jara*, en kiu eksaj redaktoroj de la revuo rakontas pri la spertoj en siaj respektivaj periodoj. Ni kreis grupon, kiu kunligas la plej aktivajn kontribuantojn kaj TEJO-estraranojn por helpi, kundecidi kaj diskuti aferojn ligitajn al *Kontakto*. Partnerece kun Vinilkosmo ni ankaŭ lotumis inter niaj legantoj kaj kunlaborantoj tri MP3-formajn albumojn de Eterne Rima.

Magnus Henoch kreis retan programon (Facililo) por verki facilajn tekstojn por la revuo *Kontakto*. Ĝi atingebblas per nia retejo, kiu en tiu periodo ricevis 13 508 paĝo-rigardojn. Nia paĝo en Facebook havas 364 ŝatantojn kaj nia Twitter-konto 588 sekvantojn.

Por la venonta jarkolekto ni jam decidis fruiĝi unu monaton la limdatojn por la kontribuoj, tiel ke ĉiuj numeroj atingu la abonantojn ene de kuranta jaro. Novaj rubrikoj estas planataj.

En 2012 *Kontakto* havis 702 pagitajn abonojn, 49 pli ol en la antaŭa jaro.

Mallongigoj

Jen la listo de la mallongigoj kaj akronimoj uzataj en la raporto kun iliaj respektivaj signifoj.

AEGEE	Eŭropa Studenta Forumo
ARKONES	Artaj Konfrontoj en Esperanto
BEJO	Brazila Esperantista Junulara Organizo
CO	Centra Oficejo de UEA/TEJO (Roterdamo)
EACEA	Plenumagentejo pri Kulturo, Edukado kaj Aŭdvidaj Aferoj
EU	Eŭropa Unio
EVS	Eŭropa Volontula Servo
FEDI	Eŭropa Forumo por Diverseco kaj Kulturo
FOJE	Forumo Junulara Eŭropa
ICMYO	Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizoj
IJF	Internacia Junulara Festivalo
IJK	Internacia Junulara Kongreso
ILEI	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
JES	Junulara E-Semajno
JUSKA	Junulara Somera Komuna Aranĝo
KER	Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
KODEJO	Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj
LS	Landa sekcio de TEJO
MGCY	ĈefGrupo por Infanoj kaj Junularo de UN
TA	TEJO-aktuale
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TT	TEJO tutmonde
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UK	Universala Kongreso de Esperanto
UN	Unuiĝintaj Nacioj